

# La Espero

SVENSKA ESPERANTO-TIDNINGEN

## EL LA ENHAVO

Sveda kampanjo por la angla 2

Pentekoste? Stockholm! 4

Londono alvokas 6

Skandinava grupvojaĝo 7

Ĉu skandinavoj atingis  
Amerikon antaŭ Kolumbo? 8

Nikolae Iorga 10

Abono 15 sv. kr.

Poŝtĝiro: SEF 20 12

1

1971

59-a jaro





## LA REDAKTORO:

Jam de longe La Espero aperas sesfoje dum la jaro. La kostoj por ĝi ja estas altaj, kaj ni opinias pli bone eldoni relative bonkvalitan 12- aŭ 16-paĝan numeron ĉiun duan monaton ol pli maldikan ĉiun monaton. Ĉar tiu aranĝo jam fariĝis konstanta ni decidis forlasi la duoblan numerigon kaj ek de tiu ĉi jaro eldoni numerojn 1 ĝis 6. La ŝanĝo neniel influos al la reguleco de la eldonado — ni intencas ankaŭ ĉi-jare aperigi ses numerojn, principe je la mezo de ĉiu du-monata periodo.

Eble vi miro, ke ni ĉi-apude publikigas tekston, kiu fakte argumentas por la angla lingvo. Ni faras tion unuavice ĉar multaj el la argumentoj — kiel diras enkonduke "ulu" — estas aplikeblaj al Esperanto. Duavice, ĉar ni pensas ke al ni ĉiuj utilas koni la argumentojn, kiujn oni uzos por granda aŭtuna kampanjo en Svedujo kun la celo igi plenkreskulojn lerni la anglan lingvon. Estas urĝa tempo por ni atentigi la grandan publikon pri la troigo de la rolo de la angla en la mondlingva kampo, troigo kiu estas tiel ĝenerala en nia lando.

En tiu ĉi numero vi trovos sufiĉe multe da aktualaj informoj. Oni klarigas al vi kial vi veturu al Stockholm pentekoste kaj kiom kostos, kaj aperas la unuaj informoj pri la skandinavia grupvojaĝo al la 56-a UK en Londono. Kaj pri la metropolo mem s-ro J. Gifford Fowler verkis interesan artikolon.

Aperas la dua artikolo de Hugo Löfgren pri la vikingoj en Ameriko, kaj en tiu konekso ni publikigas interesan mapon, montrante kiel oni verŝajne imagis al si la nordan parton de Eŭropo antaŭ mil jaroj. Se vi havas intereson pri historio ni esperas, ke vi estos kontenta pri tiuj paĝoj, se vi ne havas, ni konsolas vin per tio, ke en venontaj numeroj ni aperigos artikolojn pri tute aliaj temoj.

Kiel ni aliloke informas, s-ro Morariu realiĝis al la redakcio, nun kiel redaktoro por la literaturo parto. Pro manko da spaco tiu ĉi numero tamen ne havas apartan literaturan paĝon. Tamen ni havas (paĝo 10) artikolon pri Nikolae Iorga — mondfama historiisto kaj verkisto rumana — kaj tradukon de unu el liaj poemoj.

Fine ni ankoraŭfoje ripetas, ke ni volonte aŭdas la opiniojn de niaj legantoj pri la enhavo de La Espero. Skribu al ni — ne nur por laŭdi — ĉar estas nia ambicio fari la revuon kiel eble plej interesa por ĉiuj niaj legantoj.

Ake Blomberg

Numero 1 59-a jaro  
JAN.-FEB. 1971

## ENGELSKA FÖR ALLA?

I höstas lämnade TRU (Kommittén för TV och radio i undervisningen) sina petita, där de begär anslag för sin verksamhet budgetåret 1971—72. Som bilaga fanns en PM, "Engelska för alla", utarbetad av en utredningsgrupp under TRU:s expertgrupp för vuxenutbildningsfrågor, TRUVUX.

"Engelska för alla" är ett principförslag som går ut på att göra alla som inte kan engelska intresserade av att lära sig det. Hösten 1972 börjar enligt förslaget en omfattande kampanj i bl. a. TV. Därefter följer en kurs med början hösten 1973.

Eftersom TRU i inledningen tar upp många av argumenten för esperanto och använder dem för engelska, publiceras här ett utdrag.

Argumenten bygger ofta på missuppfattningar och fördomar, som dock inte TRU kan lastas för, eftersom åsikterna är vanliga i hela det svenska samhället.

Ungdomen blir inte tvåspråkig genom undervisningen i engelska. Endast några få universitetsstudenter och utlandssvenskar når någorlunda kunskaper för att kallas tvåspråkiga.

Orsaken till att vi möter många engelsktalande i Sverige, utomlands och i radio-TV är att många i Sverige har lärt sig engelska, att de söker sig till engelsktalande, och att utlänningar känner till det. Det är en missuppfattning att vi skall lära oss engelska därför att vi möter engelsktalande — vi möter engelsktalande därför att vi lärt oss engelska.

Jämlikhetsaspekten är mycket tvivelaktig när det gäller engelska, och TRU har helt glömt bort den internationella sidan av jämlikheten.

Det finns mer att säga med anledning av rapporten. Men viktigast är kanske att det internationella språkproblemet är för litet känt i Sverige och att esperanto borde nämnas oftare i den svenska kulturdebatten.

ulu

### I. INLEDNING

Behovet av en riksomfattande informations- och utbildningsinsats i syfte att bibringa hela svenska folket grundläggande kunskaper i engelska, "Engelska för alla", har förts fram i skilda sammanhang under senare tid, bl. a. i SAP:s jämlikhetsrapport. Motiven för en sådan satsning är mångfaldiga. Huvudmotivet ligger dock i det faktum att det i dagens läge föreligger en stor diskrepans mellan ungdomen, som genom skolundervisningen i stor utsträckning blir tvåspråkig, och föräldragenerationen, som i allmänhet inte åtnjuter någon undervisning i främmande språk under sin skolgång, allt detta medan de internationella kontakterna ökar och behovet av kunskaper i engelska blir allt mer påtagligt.

Skälen för en insats med sikte på att väsentligt vidga kretsen av engelskstuderande och i någon mån engelskkunniga kan sammanfattas i följande punkter.

#### 1. Användningsområdet ökar

Engelskans ställning som det stora världsspråket i kombination med den ökande internationaliseringen innebär att allt fler människor möter engelska språket och skulle ha användning för det i allt fler sammanhang. Dessa kontaktpunkter med språket har ökat och fortsätter att öka genom att allt fler reser utomlands och då har användning för engelska, inte bara i Storbritannien och USA, utan som andraspråk och hjälpspråk överhuvud. Allt fler möter också engelsktalande här hemma, på arbetsplatser, i affärer, på fritid o. s. v., och även

här gäller, att det inte bara är frågan om dem, som har engelska som modersmål, utan också alla de för vilka det är första hjälpspråk. En specialaspekt av detta är att **allt fler unga** har, och i viss mån använder engelskan som kommunikationsmedel. Till detta kommer så alla de **indirekta kontakterna med språket**: i radio, tv, film, skivor, band, annonser, tidskrifter, underhållningsframträdanden o. s. v. samt dessutom den tendens till ökad användning av engelska låneord i vårt språk som finns för närvarande. Även inom arbetslivet ökas behovet av kunskaper i engelska genom ökad användning av fackuttryck, anvisningar, facklitteratur m. m. på engelska, en utveckling som inte minst de expanderande multinationella företagen bidrar till.

#### 2. Jämlikhetsaspekten

De som inte har engelskkunskaper ställs i en rad konkreta situationer i ett underläge. Detta sker på många olika sätt: färre och ytligare kontakter vid utlandsresor, både med människor och miljöer, isolering från de engelsktalande de möter här hemma, utanförställdhet och mindrevärdeskänslor gentemot de unga, magrare utdelning av informations- och underhållningsflödet, sämre chanser till fortbildning inom yrket, mindre möjligheter att resa ut, ge och ta emot impulser internationellt.

Sammanfattningsvis kan man alltså säga att de icke engelskkunniga utgör en i allt högre grad missgynnad grupp, både praktiskt/konkret och psykologiskt. Naturligtvis är det som nu nämnts gränser som kan



övervinnas först i och med betydande kunskaper i engelska, d. v. s. en nivå som ligger betydligt över vad man kan uppnå med en aktion av här åsyftat slag. Arbetsgruppen vill dock understryka värdet av även mer begränsade kunskaper i engelska. Framförallt på det psykologiska planet kan ett övervinnande av det första motståndet, och den största "utanförkänslan" vara av stort värde.

### 3. Problemets storleksordning

Den kategori av människor som skisserats ovan under p. 2 är inte en minoritetsgrupp i vårt samhälle i dag, utan den omfattar huvuddelen av den vuxna befolkningen. Denna grupp är och förblir under lång tid så stor och heterogen att den är värd **stora insatser** och kräver ett **brett sortiment** av specialinriktade och varandra stödjande åtgärder för att nås. En mycket grov uppskattning av storleksordningen ger följande resultat. Av den nu vuxna befolkningen torde ca 70 procent inte fått nämnvärd engelskundervisning i skolan. Det gör ca 5 miljoner människor. Av dessa torde högst 20 procent ha påbörjat eller deltagit i studiecirkel, korrespondensundervisning, kvällsgymnasier, radiokurser eller genom enskilda studier förvärvat kunskaper i engelska.

Slutsatsen blir att det sannolikt återstår en grupp på omkring **4 miljoner vuxna** som saknar elementära kunskaper i engelska men som alltmer "möter" engelska och kommer i ett underläge socialt och kulturellt. Problemet att ge "engelska åt alla" är således av en helt annan storlek och svårighetsgrad än vad som kan mötas med aktioner och kurser av den typ som hittills använts. Av erfarenhet vet man att sådana insatser bara når små fraktioner, sannolikt också i mindre grad dem, som är helt utan engelska.

— — —

### SEMAJNO DE INTERNACIA AMIKECO

— den internationella vänskapens vecka —

är i år under tiden **21—28 februari**. Sänd hälsningar till Dina vänner!

I år finns även brevmärken att sättas på kuvert eller kort. Pris **60 öre** per ark om 6 st. (inkl. moms). Utan tidsangivelse, men bör användas **endast** i samband med vänskapsveckan.

Dessutom postkort, 40 öre/st. för större format, 20 öre för mindre.

Beställes hos

Stiftelsen AMIKECO TRANS LIMOJ (ATL)

S-690 60 Hällabrottet.

Postgiro 14 32 60.

## FELLOW—THINKER

Kiel ĝojiga surprizo alvenis ĉe ni la unua numero (14 novembro 1970) de tiu ĉi angla-lingva informilo pri Esperanto. Oni intencas ĝin eldoni dufoje monate. Adreso: **Esperanto Institute, Post Box 604, New Delhi - 1, Hindio**. Niaj samideanoj laborantaj en tiu tre vasta kaj grava lando meritigas gratulojn kaj apogon pro la brava iniciato. Frontpaĝa artikolo informas ke i. a. nia jugoslavia samideanino kaj esperantoverkistino Zora Heide kiu en aprilo vizitis New Delhi grave inspiris la realigon de la projekto, El la informoj en la unua numero speciale interesas nin la jenaj du:

### Geedziĝo

**Samideano Abani Halder** kaj **samideanino Roma Deb** geedziĝis la 18-an de oktobro 1970 en Hailakandi (Assam).

(S-ano Abani Halder, kiu partoprenis la SEF-kongreson en Sundsvall en 1968 kaj kiu en la aŭtuno de la sama jaro faris prelegvojaĝon al kelkaj svedaj kluboj — li studis en Kopenhago — estas konata en Svedujo kaj la redakcio de La Espero sincere gratulas kaj bondeziras al la nov-geedzoj.)

### UNO — Universitato

Japanio prezentis al UNO allogan planon krei universitaton por la instruado de gvidantoj de la membroŝtatoj de la mondorganizaĵo. La proponita universitato kapablos akcepti 900 studentojn al kiuj instruos 130 profesoroj el la tuta mondo. La granda avantaĝo de tia vasta rondo de instruistaro estas, ke la universitato povos objektivite prezenti la kulturon kaj historion de multaj el la membroŝtatoj. La kursoj rilatos al kvin kategorioj, nome internaciaj rilatoj, ekonomia evoluado, eduka evoluado, kulturo kaj regionaj studoj.

Japanio jam ofertis konstrugrundon kaj konstruaĵojn por tiu ambicia projekto. Hindio estas inter la ŝtatoj kiuj montris grandan intereson por ĝi. La ideon krei UNO-universitaton vekis U. Thant dum la ĝenerala asembleo en 1969.

# VI SES

# I

# STOCKHOLM

# ÅRSKONGRESS

# SEF

# PINGST

# 1971!

Esperantokongresen 1971

Gerdman

Sibyllegatan 83

114 43 Stockholm



# PENTEKOSTE? STOCKHOLM!

Jes, la 29—31 de majo 1971

## Kion fari tie?

En la antaŭa numero de La Espero vi legis pri Stockholm kiel ŝanĝiganta urbo. Sed se ne sufiĉas por vi rigardi novajn konstruaĵojn, aŭ malnovajn konatajn domojn el neatenditaj direktoj, vi ja povas ankaŭ viziti la jarkongreson de SEF.

La programo ne estas finfiksita ankoraŭ. Sed jen tio kio estas fiksita:

### Hotelo

La kongresanoj loĝos en la konata kongreshotelo Malmen. Vi atingas ĝin per subtera fervojo, tri haltejoj for de la centra stacidomo. Tamen la hotelo havas malaltajn prezojn kompare kun aliaj. En la ĉirkaŭaĵo de la hotelo, kaj en la hotelo mem, troviĝas pluraj manĝejoj.

Gejunuloj ankaŭ loĝos en la sama hotelo sed je subvenciigita kotizo.

### Kongresejo

Prelegoj kaj kunsidoj estos en Medborgarhuset je la alia flanko de la strato. La hotelo kaj la kongresejo estas kunligitaj per vojo sub la strato.

### Ĉefa programo

La plej grava punkto de la programo estas kompreneble la jarkunveno de SEF.


Alia grava programero kutimas esti prelego. Sed ĉi-jare ni planas anstataŭi ĝin per podia diskuto pri problemoj kiu tuŝas nian movadon.

### Bankedo

Festa supeo okazos en la sabatvespero ĉe Högloftet, Skansen. Estos komuna vojaĝo tien kaj reen per aŭtobuso.

### Poŝtstampo

LJK petis specialan poŝtstampon por la kongreso.



### Ekskurso

La ekskurso kondukos vin al Drottningholm, interesa kastelo kiu enhavas multajn vidindaĵojn. Carma parko ĉirkaŭas ĝin.

En la lundmateno, antaŭ la ekskurso, estos ebleco por tiuj kiuj havas intereson viziti diservon en la unika Allhelgonakyrkan, konstruita el ligno.

### Prezoj

La partopreno kostas 25:—, por gejunuloj en SEJU 10:—. Se vi loĝos en dulita ĉambro, koston 43:— po nokto, kaj en unulita ĉambro 51:—. SEJU-anoj pagas la subvencian prezon je 10:— po nokto. Matenmanĝoj kostas 7:—. Por aliaj manĝoj kalkulo 8—10 kronojn en la proksimaj manĝejoj, krom la supeo kiu kostas 40:—. La ekskurso kostas 15:—.

### Fervoja rabato

Ĉiuj aliĝintoj ricevos karton de SJ, per kiu oni donas rabaton je la vojaĝoj sur svedaj fervojoj.

### Aliĝoj

En tiu ĉi numero de La Espero vi trovas aliĝilon, sur kiu ankaŭ staras ĉiuj prezoj. Vi povas ankaŭ ricevi ĝin rekte de LJK, adreso Esperantokongresen 1971, Gerdman, Sibylleg. 83, 114 43 Stockholm. Poŝtgirkonto estas 50 74 61-2, Kommittén för esperantokongresen i Stockholm. Se vi volas telefoni, uzu numeron 08-60 49 72 al Gun Gerdman.

### Ne forgesu

Aliĝu antaŭ la 30a de aprilo!

Kaj ne forgesu aliĝi.

ulu



# RECENZOJ

## NORDA PRISMO 3/1970

Dika, enhavoriĉa kajero, preskaŭ libreto. Ĉi-foje malmulte da tradukoj. Aro da bonkvalitaj originalaĵoj atestas pri la forta vivo de esperanto kaj inspiras kredon pri ĝia estonto. Cefparte la kontribuajoj distingiĝas per flua, modela esperanto, kaj ĉi-foje oni facile legas NP sen helpo de angla vortaro...

"Septembra maro" de M. Ŝekerĝiev estas preskaŭ senmakula perlo kaj meritas tial ĉi specialan mencion.

Dankon kaj gratulon pro n-ro 3!  
S. A. J.

## GAJAJ KLUBVESPEROJ

Skeĉoj kaj ludoj de G. Riisberg k. a. Dansk Esperanto-Forlag.  
Prezo: 4 dkr.

Tre taŭga helpilo por la klublaboro. La libreto (32-paĝa) enhavas dekunu skeĉojn kaj priskribas kvar ludojn. Multaj el la skeĉoj estas por du aktoroj, do, tre konvenas por malgrandaj rondoj. Kelkaj estas tre mallongaj, la lingvo simpla kaj klara, ili sekve postulas nek grandan memorkapablon nek eksterordinaran talenton. Certe ili taŭgas eĉ por pligajigi ordinarajn studvesperojn. Ni bezonas pli da tiaj libretoj!

obo

## SOVETA ESTONIO

Eldonejo Eesti Raamat. Tallin 1970.

Bela, riĉe ilustrita broŝuro pri Estonio fakto-plene priskribas ĉiun sektoron de la "nacio". En preskaŭ mikrofilma maniero oni sur ĉ. 40 paĝoj enpemis amason da informoj, tiel donante ŝajne kompletan superrigardon pri la evoluo kaj la aktuala situacio de tiu regiono. Absoluta koncentro de pure informa teksto montras la sunan fasadon tute laŭcele de simila broŝuro.

S. A. J.

## FOTNOT

är namnet på en liten informations-skrift vars första nummer kom ut i december 1970. Utgivare: SEJU och Språk 2, arbetsgruppen för information om språklig diskriminering. Redaktör för nummer 1: Ulla Luin. Första numret ägnas "en annan språkdebatt", en sammanfattning av debatterna vid TEJOarrangemangen i Graz.

Skriften är modernt och trevligt upplagd, argumentationen saklig och med inriktning på väsentliga sociala och internationella problem. Den torde vara något att sätta i händerna på dagens studerande ungdom.

## PRENUMERERA

FÖR 1971 PÅ

## ESPERANTO-TIDNINGAR

Dana-Esperanto-Bulteno	17: 50
Heroldo	22: —
Kontakto	15: —
Kvinpinto	4: 50
Kvinpinto, stödjande	8: 50
Norda Prismo	17: —
Oomoto	13: —
La Praktiko	17: 25
Sennaciulo	26: —

Moms tillkommer ej på dessa priser. UEA:s tidskrift "Esperanto" erhålles genom medlemskap i UEA och SEF:s "La Espero" genom Svenska Esperanto-Förbundet. Se särskilt meddelande.

Förlaget förmedlar avgifter även till andra Esperanto-tidskrifter men kan ej ta ansvar för att dessa levereras.

## ESPERANTOFÖRLAGET

Fack, 200 42 Malmö 7  
Postgiro 578

## Aŭskultita konversacio

- Kial vi ne edziĝas?
- Ne, tamen estas al mi bone. Mi ja prizorgas mian komercejon, kaj havas du fratinojn, kiuj mastrumadas por mi.
- Du fratinojn, jes, sed tio ne povas esti sama.
- Ne diru tiel, ili ne estas miaj fratinoj.

# TRA LANDO DE INDIANOJ

av TIBOR SEKELJ

En reseskildring från Sydamerikas djungler.

Just nu utkommen på Esperantoförlaget.

Hft kr. 24: —.

Inb. kr. 30: —.

Moms tillkommer.

## ESPERANTOFÖRLAGET

Fack

200 42 Malmö 7

Postgiro 578-5



# LONDONO ALVOKAS

De J. Gifford Fowler

At length they all to merry London came (Al gaja Londono fine ĉiuj venis)

— el Prothalamion, de Edmund Spenser, 1552—1599

La statuo de Amoro, kiun oni elektis kiel simbolon de la 56-a Universala Kongreso, staras en la mezo de Piccadilly Circus, en la nabo de Londono. Sed kio estas tiu Londono? Kion ĝi prezentas por la vizitanto?

Unu vizitanto, kiu ne estis anglo, diris antaŭ kvincent jaroj: "Londono, vi estas inter ĉiuj urbegoj floro!" Antaŭ ducent jaroj D-ro Johnson, la leksikografo, kiu naskiĝis ne en Londono, rimarkigis: "Vidinte Londonon, mi vidis tiom de la vivo, kiom povas montri la mondo", kaj plue: "Kiam iu homo enuas pri Londono, li enuas jam pri la vivo."

Londono certe posedas ian kaŝitan kvaliton, per kiu ĝi enamigas al si eĉ tiujn, kiuj ne estas ĝiaj propraj infanoj, kaj vekas en ili specon de patriotisma sento por ĝia honoro. Ĉu ne la roma imperiestro Augustus volis doni al ĝi sian propran nomon? Eĉ kimra historiisto de la mezepoko, por ke oni ne estimu antaŭ ĝi alian urbon, rakontis en sia grava verko legendon tute ne kredindan, ke ĝi estis fondita ok jarojn antaŭ ol Romo.

Oni efektive ne scias, en kiu jaro fondiĝis Londono. Preskaŭ certe antaŭ ol meze de la unua jarcento antaŭ Kristo, venis la Romianoj, kiuj latinigis kiel **Londinium** ĝian antaŭan keltan nomon. Tiuj romianoj tie konstruis ponton el ligno ĉe la loko plej proksima al la maro, kie por ili Tamizo estis pontebla. De tiam la Londona Ponto restas fama, kaj de tiam jarcenton post jarcento la urbo kreskis.

Ne supozu, tamen, ke en Londono vi trovos imponajn romiajn restaĵojn. Restas nur kelkaj baskoj de la urba muro, kelkaj ŝtonoj de templo de Mitrao k. t. p.

Oni ne forgesu, ke Londono estis diversfoje detruita. La Monaĥo Fitzstephen, kiu en la 12-a jarcento verkis priskribon pri Londono, klarigis, ke "la solaj malkonvenaĵoj de Londono estas la malmodera drinkado de stultuloj kaj la oftaj incendioj". (Eble ekzistis rilato inter la du fenomenoj, kiuj tamen nun ne plu estas timindaj.) El tiuj incendioj la plej fama okazis en 1666, kiam pereis kvin sesonoj de la urbo.

Malgraŭ tio restas al ni kelkaj preĝejoj el la mezepoko kaj kelkaj aliaj konstruaĵoj. Inter ili vi certe volos viziti **Guildhall** (Urbodomon), kie en 1907 D-ro Zamenhof paroladis pri patriotismo; ankaŭ **Westminster Abbey** (Abatejo de Westminster), kaj la "**Turon de Londono**", grandan antikvan fortikaĵon, kie oni



povas vidi, inter aliaj interesaĵoj, la reĝajn juvelojn.

Ni fieras ankaŭ pri la belaj konstruaĵoj kreitaj post tiu Granda Incendio de 1666. Menciindaj estas tuta serio da preĝejoj, konstruitaj tuj post la Incendio ĉiuj de unu sola arkitekto, Sir Christopher Wren, al kiu ni ŝuldas ankaŭ la bazilikforman **Katedralon de Sankta Paŭlo**. La amanto de arkitekturo trovos aparte frapa la vigran elpensemon, kiun atestas iliaj turoj.

Inter tute modernaj konstruaĵoj, interesaj estas **Royal Festival Hall** (koncerthalo, kie okazos nia inaŭgura kunsido), la mirinde bela **ponto de Waterloo**, kaj la **Radiotelefonio Turo**, de kies supro oni vidas panoramon de la urbejo.

Londono tamen ne konsistas nur el brikoj kaj ŝtonoj. Ni sentas fieron ankaŭ pri niaj verdejoj. La parkoj estas multaj, grandaj kaj malgrandaj. **Hyde Park**, ekzemple, kovras proksimume 350 hektarojn, kaj flanke de ĝi kuŝas **Kensington Gardens** (275 ha.). Eĉ pli vasta estas **Regents Park** (400 ha. kun zoologia ĝardeno). La parkoj havas belajn florbedojn, sed plejparte estas neformalaj; kaj sur la herbejoj oni rajtas... marŝi, ludi, sidi, kuŝi, kaj pikniki. En Hyde Park oni povas ankaŭ naĝi en la lago.

Apartaĵo de Londono estas malgrandaj parkoj aŭ ĝardenoj sur multaj el la placoj. Kelkaj el tiuj parkejoj estas nun publikaj, sed aliaj estas kvazaŭ privataj komunaj ĝardenoj de la loĝantoj de la domoj ĉirkaŭ la placo.

Multaj kongresanoj volos viziti la muzeojn kaj artgaleriojn, pri kiuj Londono prave fieras. Endaj estas **Brita Muzeo**, **Nacia Artgalerio** (ĉe la fontanoj kaj kolomboj de Trafalgar Square), kaj **Galerio Tate** (moderna arto).

Aliaj volos butikumi en la grandaj magazenoj, kie pro valutaj kaj aliaj kaŭzoj la prezoj estas por multaj eksterlandaj vizitantoj nun tre maltaj. Aŭ eble oni preferos simple paŝumi laŭ Regent Street, Bond Street

kaj Oxford Street por rigardi la montrofenestrojn... kaj ni ne forgesu pri **Carnaby Street** por lastmodaj junulaj vestaĵoj.

Laŭ unu fama politikisto la rivero, Tamizo, estas "likva historio". Per plezurŝipejoj oni povas facile kaj komforte veturi sur ĝi, vidante samtempe la urbon.

Alia bona posteno por gapi estas seĝo sur la imperialo de ruĝa Londona aŭtobuso.

Sed — se oni havas liberan horon — oni plej bone esploru Londonon surpiede. Kvankam ĉe la grandaj stratoj oni trovas la plej imponajn monumentojn, tamen nur laŭirante la kaŝitajn stratetojn oni vere ekonas la spiriton de Londono kaj ekamas nian vastan, grizan, amikecan urbon. Tiuj malgrandaj vojoj ofte havas strangajn, interesajn nomojn, ekzemple: **Hanging Sword Alley** (voĵeto de la pendanta glavo), **Jacob's Wells Mews** (stalaleo de la puto de Jakobo), kaj **Bleeding Heart Yard** (korto de la sanganta koro). Kelkaj stratetoj portas la nomon de la varoj, kiujn oni antikve vendis tie, ekzemple: **Wood Street** (lignostrato), **Bread Street** (panstrato), **Beer Lane** (bierstrato), eĉ **Love Lane** (amstrato)!

Kompreneble, ke por ĉion vidi ne sufiĉas unu semajno (nek unu jaro). Per niaj arangoj ni faras nian eblon, se ne por satigi ĉiun guston, almenaŭ por veki ĉies apetiton.

Multon oni skribis malŝate pri la Londona vetero. Aŭtoroj de la pasinta jarcento ofte priskribis ties flavajn nebulegojn. Hispana romanisto nomis Londonon "la civito de la nebuloj". Tiajn dirojn oni ne atentu. Hodiaŭaj saĝaj leĝoj tiel malpliigas la produktadon de fumo, ke eĉ en Novembro oni malofte ŝpertas gravan nebulon, kaj certe ne plu flavan.

Ni aldonu, por kuragiĝi niajn eventualajn gastojn, ke, kiam lastfoje la Universala Kongreso okazis en Londono, oni spertis semajnon de perfekta vetero.

La historio ripetigu!

## UEA-avgiften

för direkt medlem får Ni inte glömma bort. Se annons i tidigare nummer av La Espero. Vi här i Sverige har faktiskt råd lämna UEA ett stöd och betala 43 kr. för både årsbok och tidn. Postgiro 14 74 29-5 (Svenska Esperanto-Förbundet, specialkonto, Malmö). SEF



# Till LONDON Till VÄRLDSKONGRESSEN 1971 Till DUBLIN PÅ IRLAND

Det blir även i år en skandinavisk gruppresa till esperantovärldskongressen. Herr och fru Kühlmann, Köpenhamn, välkända och mycket uppskattade, blir reseledare.

Lördagen den 24 juli reser gruppen på eftermiddagen från Köpenhamn med flyg direkt till Irlands huvudstad Dublin och far omedelbart till den närlägnade förtjusande badorten Dun Laoghaire, där den stannar veckan före kongressen, badar, vilar och gör utfärder till Dublin och till den irländska landsbygden.

Sedan bär det iväg med flyg till London, där världskongressen väntar med hela sitt program.

Lördagen den 7 augusti är det tid för hemresa med flyg till Köpenhamn, dit man anländer på eftermiddagen.

Priset är ej definitivt fastställt, enär man — när detta skrives — väntar svar på några detaljer. Men för samtliga flygresor, hotell med halvpension på Irland, hotell med frukost i London, omnibusresor, flygplatsavgifter etc. kommer priset

ganska säkert ej att överstiga sv. kr. 1.800:—.

Ni skall givetvis vara med. Anmäl Er då till kongressen. Se upplysningar härom på sista sidan.

Skriv samtidigt efter informationer och anmälningsblankett till den skandinaviska gruppresan. Det gör man hos **S-ino Ester André, Ryttsmästaregatan 12, 217 52 Ma'mö**. Så fort vi är färdiga med alla uppgifter, översändes begärda blanketter och informationer.

Lycka till!

SEF

## KION POVAS

### FARI SVEDUJO?

La 14-an kaj 15-an de novembro okazis en Stokholmo konferenco pri la temo: "Kion povas fari Svedujo?" ("Vad kan Sverige göra?"). 16 organizaĵoj pacaĵ, sociaĵ, idealismaĵ kaj politikaj invitis al tiu konferenco, kaj unu el tiuj kunarangantoj estis SEF. Ĉirkaŭ 200 reprezentantoj el 70-o de diversaj organizaĵoj partoprenis. Je nomo de SEF partoprenis la sekr. de SEF, Sven Alexandersson, gesinjoroj Luin kaj mi.

La demando: "Kion povas fari Svedujo?", rilatis al internacia solidareco kaj eksteren kaj en nia lando mem.

Ambasadorino Inga Thorsson rakontis iom pri la sveda partopreno ĉe UNO en la helpprogramo por la evoluantaj landoj. Ŝia ĝenerala impresoj el ĉiutaga UNO-laboro estis, ke la sveda partopreno, laŭ nia vidpunkto minimuma, en diversaj helpinstancoj estas ofte pli alte taksata ol oni imagas en Svedujo.

Gen. dir. Ernst Michanek el la sveda organo por evoluhelpe, SIDA, ĝenerale prelegis pri ĝia planita laboro ĝis 1974/75.

Sekvis tiujn du ŝtatajn reprezentantojn akra kritikanto, Leif Dahlberg, aktiva en stokholma socialdemokrata partio. Li volis aserti, i. a. kun citaĵoj el nova broŝuro de SIDA. (U-land. Försök till beskrivning av några utvecklingsproblem, SIDA 1970), ke sveda evoluhelpe estas nur malhelpa, bremsa, pro ĝia troligiteco

al la kapitalismaĵ vidpunktoj en la okcidenta mondo.

Kompreneble ĉi lastaj eldiroj estis debatigaj al la diskutema publiko. Ankaŭ antaŭ posttagmezaĵ grupdiskutoj oni aŭskultis prelegojn pri la enlanda edukado ĝenerala pri ĉi tiaj problemoj kaj por aktiva laboro en la Tria Mondo.

Sven Moberg, Ministro, bombasme komencis: "Ni en Svedujo estos dulingvaj. Instruado pri la angla lingvo estas deviga dum sep (7) jaroj en la elementa lernejo. Tio estas tre bona por la internaciaĵ komprenemo kaj komunikado." La ironia ridetemo de ni SEF-representantoj estis neretenbla. Ni ankaŭ levis la demandojn pri la konsiderinda diskriminacio kultura kaj limigo de informado, kion sendube kaŭzas la instruado pri angla lingvo en nia lando. Sufiĉe intensa diskuto rezultigis. La relativa komprenemo por niaj argumentoj estis mirinde nenegativa. Ankaŭ antaŭ la granda publiko kaj la ministro Ulla Luin resumis niajn vidpunktojn.

Oni ankaŭ diskutis la problemojn de la politikaj rifuĝintoj. I. a. oni deziris pli intiman kunlaboron kun diversaj sindikatoj, kiam enmigrintoj/rifuĝintoj devas trovi laboron en Svedlando.

Konklude oni povas diri ke la konferenco ordigis kaj klarigis multajn demandojn rilate al la konferenca temo. La ĉefa profito el partopreno en similaj konferencoj por ni esperantistoj estas ke ni havas okazon atentigi pri la lingva problemoj el ĉiuj flankoj al homoj, kiuj sendube estas gravaj en siaj respektivaj organizaĵoj, krome la personaj kontaktoj por estonta pli ekstera laboro povas naskiĝi.

Tomas Jansson



### NOVA LITERATURA REDAKTORO

Ek de tiu ĉi numero Tiberio Morariu funkcias kiel literatura redaktoro de La Espero. Kiel tia li havas antaŭ ĉio la taskon lingve kontroli la literaturajn kontribuadojn — grave, ĉar ni deziras lingve altan nivelon. Kompreneble la literatura redaktoro — se lia libera tempo sufiĉas — havas ankaŭ aliajn taskojn rilate al la literaturaj paĝoj, kies enhavo estos elektata en kunlaboro inter li kaj la ĉefredaktoro.

Ni ĝojas ke ni sukcesis persvadi s-anon Morariu denove transpreni iom de la redakta laboro. Tio grave faciligos la taskon de la ĉefredaktoro kaj permesos al li dediĉi pli da tempo kaj atento al la ĝenerala enhavo de la gazeto.

La Espero fakte nun havas redaktan komitaton — Sune Ahlm jam de longe kunhelpas je la teknika aranĝo. Krome s-ano S. A. Jacobson multe kunhelpas, speciale kiam temas pri kontrolo kaj elekto de poeziaĵoj. Ni esperas ke ni kune — kaj kun la helpe de multaj aliaj kunlaborantoj inter niaj legantoj — povos krei ĉiam pli bonan kaj varienhavan gazeton.

Ake Blomberg



# Ĉu Skandinavoj atingis Amerikon antaŭ Kolumbo?

**Hugo Löfgren** daŭrigas sian artikolon, kies unuan parton vi trovis en la decembra numero, pri la supozeblaj veturoj en Nordan Amerikon de la nordlandanoj, kiuj koloniigis Groenlandon. Jen li prezentas novan teorion pri la situo de la mistera "Vinland". Ĝi ne estas iu parto de la orienta bordo de la Nordamerika kontinento. Pli kredeble ĝi estas la lando sudokcidente de James Bay en Kanado.

Kiu estis la norvego kiu estis entombigita apud lago Nipigon en Kanado antaŭ pli ol naŭ jarcentoj? De kie la indianoj en tiu regiono ricevis la nocion "blankuloj en ligna ŝipo" longe antaŭ ol venis tien la unuaj francoj?

En la sekvonta numero Hugo Löfgren finas sian artikolon per rakonto pri la runŝtono en Kensington.

Nun mi citu artikolon de 40-jara gazeto, kiun mi konservis ĝis nun: Vinland nek estas Labrador, nek Nova Scotia, nek alia parto de la orienta bordo de Nord-Ameriko. Pli supoze ĝi estas la lando sud-okcidente de James Bay en Kanado. Ĉirkaŭ 10 km oriente de Lake Superior oni trovis preskaŭ forkoroditan glavon, adzan nukon kaj ŝildo-tenilon, kiuj laŭ ekspertizistoj, estas de skandinava deveno kaj datigas de la 11a jarcento. Tiun trovon oni jam faris en 1931, sed ĝi estis tiom nesupozinda, ke neniu sciencisto volis riski sian reputacion. Nur ĉi-jare, post kiam granda gazeto en Kanado faris esplorojn, estis konstatite ke la trovoj kaj la trovloko ne estas falsaj. La sciencistoj interesigas pri la afero kaj oni metis la trovaĵon al Royal Ontario Muzeum en Toronto, kie ni nun povas vidi ĝin.

Estis fervojisto J. E. Dodd, kiu faris la trovon en sia min-parcelo ĉe la Blackwater-rivero ĉirkaŭ 5 km de Beardmore-stacio ĉe la alvojiga fervojo de Nipigon al Longlac. Li fosis por serĉi oron. Li estis observinta sulkecan raveneton en la rokogrundo, kaj en ĝi estis kvarca gango, en kiu, liaopinie, estas oro. Li fosis en la metro-dika tavolo de malfirmaj sedimentoj en la fundo. Por malkompaktigi la grundon li eksplodigis dinamitan kartoĉon. Poste li sur la spato observis koroditajn ferpecojn, sed li ne atentis ilin. Li opiniis ke eble estas rubo de laboriloj de orserĉantoj. En la fundo de la sulko li trovis ion, kio similis al granda, plata pelvo. Ĝi erigis pro la spato. Nek ankaŭ tion li atentis.

Ne longe poste oficisto de Ontario Fiŝa Asocio pretervojaĝis kaj ekatentis la koroditan feron en la tero kaj konstatis ke estis glavo kaj ŝildo. Li prenis ĉiujn ferpecojn, kiujn li sukcesis retrovi, kaj poste oni ankaŭ trovis pliajn pecojn. Kunmetinte la pecojn oni konstatis ke iam estis glavo, adzo kaj ŝildo. De la lasta nur restis la tenilo. Oni ankaŭ konstatis ke la objektoj estas de tipo, kiun

uzis la nordaj vikingoj en la 11a jarcento. La armiloj do kuŝis en la tersino de Kanado 900 jarojn.

Nur post kiam la esploristo J. W. Curran interesigis pri la afero, ĝi estis pli atentata. En la Blackwater-rivero, vid-al-vide al la trovloko, la rivero estas rapide fluanta. Ĉu la norvego — ĉar estas tia, pri tio oni ne dubas — ĉi tie albordigis pro la fluo?

Sed ni alproksimiĝu al la temo. Ni do konstata: Norvego mortis ĉirkaŭ 10 km oriente de Lake Nipigon kaj estis entombigita. Oni retrovis la tombon post pliaj jarcentoj. Kiam la franca esploristo kaj fondinto de la franca Kanado, Samuel de Champlain, ĉirkaŭ 1610 notis la nocion "mistigoche", kiel la indianoj nomis la francojn, li ne sciis kial la indianoj uzis ĝuste tiun nocion. Sed nun ni scias ke ĝi devenas de la Moose-tribo, kaj en ilia dialekto signifas "blankuloj en ligna ŝipo". Pro tio ni devas dedukti ke tiuj indianoj vidis lignan ŝipon longe antaŭ ol francaj ŝipoj aperis en la St. Lawrence-rivero. Ĉu ni ne povas dedukti, ke la indianoj, kiuj uzis la nocion "Mistigoche", iam kontaktigis kun la vikingoj kiuj venis al "Vinland".

Laŭ "La rakonto pri Erik Röde", konservita en la Hauks-libro, Leif la Feliculo, filo de Erik, hejmenvalante de Norvegio al Groenlando en la jaro 1000, de ŝtormo estis pelita de sia raŭto kaj venis al antaŭe ne konata lando, fore en okcidento, kie estis nesemitaĵ rikoltejoj kaj arboj, uzeblaj al domkonstruado. Lia rakonto mencias "Vinlandon". Postan jaron, 1001, staris ekspedicio de 20 viroj de Groenlando, gvidataj de alia filo de Erik, nomata Thorstein, kaj la nun maljuna Erik Röde, por esplori la novan landon, sed la ekspedicio malsukcesis pro malfortunaj ventoj.

Printempe en la jaro 1003 oni startis rean ekspedicion kun 3 ŝipoj, el kiuj 2 antaŭ unu jaro venis de Islando, kun anaro de pli ol 140 personoj, el kiuj ankaŭ estis virinoj. La

ekspedicion estris la islandano Thorfinn Karlsefni, ĉar oni intencis, se oni trovas landon aprobindan, fondi novan kolonion. Pro tio ili ankaŭ kunportis dombestojn.


Unue ili trovis landon kun grandaj, plataj rokoj. Tiun landon ili nomis "Halluland" (Platroka Lando). Post pliaj du tagoj ili venis al alia lando, kie estis arbaroj. Tiun ili nomis "Markland". Poste ili pretervelis karbon, kiun ili nomis "Kjalarnes" kaj velis laŭlonge de kalva, sabla bordo al iom pli golfeta bordo, kie ili albordigis en "Straumfjord", kaj tie ili travintris. Postan jaron ili veturis suden al loko, kiun ili nomis "Hop", kie ili trovis nekulturitajn agroj, kaj nomis ĝin "Vinland" (Paŝteja Lando). Tie ili pasigis duan vintron dum kiam ili konfliktigis kun indigenoj, pro kio ili printempe retirigis al Straumfjord, kie ili pasigis trian vintron.

Nun ili cedis al la intenco koloniigi en Vinland kaj retirigis al Groenlando kaj Islando. Tio estis laŭ la rakonto de Hauks-libro. Iom alian rakonton havas la Flatö-libro en pliaj esencaj partioj. Laŭ ĝi ne estis Leif Eriksson, sed alia, alie nekonata persono, Bjarne Herjulfsson, kiu, ŝtormpelita jam en 985, la unua vidis Vinlandon. Nur post 16 j. Leif Eriksson faris esplorvojaĝon kaj trovis la nomatajn landojn, sed lia Vinland situas aliloke ol tiu de Hauks-libro. Laŭ Flatölibro oni ricevas percepton pri bordo norde, etendigante oriente-okcidente kun pliaj golfoj suden.

Jam postan jaron Leif reiris hejmen, kaj poste ili faris tri veturojn, duan jaron gvidate de Thorvald Eriksson, poste misveturo de Thorstein, poste unu de Thorfinn, kaj fine unu, gvidate de filino de Erik Röde, Freydis. Ĉiuj konataj de Hauks-libro.

Poste oni ofte vizitis Vinlandon por tie ĉerpi konstru-materialon. La lasta islanda notaĵo estas de 1347, sed la dana ekspedicio 1472 al Groenlando ankaŭ vizitis Vinlandon.





Historiaj notajoj pri la nordaj landoj dum la vikinga tempo estas tre malabundaj. Unu el tiuj, kiuj ion sciigas al ni pri tiu epoko estas la arĥiepiskopo Adam de Bremen-Hamburg. Li mem ne multe vidis de sia diocezo, sed li kolektis sciigojn de misiistoj kaj aliaj vojaĝantoj, kaj laŭ tiuj sciigoj li skribis historion pri sia diocezo. Mapojn li ne disponis, kaj nek ankaŭ li desegnis mapojn, sed li priskribas la situon de la diversaj lo-

koj. Laŭ tiuj priskriboj nun dana arkeologo, A. A. Björnbo, desegnis mapon. Antaŭ li ankaŭ germana sciencisto, H. Krabbo, faris tian mapon, kaj ili tre kongruas. Ĉu tia estis la percepto pri la norda mondo de episkopo Adam?

Tiu Adam la unua en la mondliteraturo mencias la veturon de Leif Eriksson al Vinland, kiu okazis antaŭ 70 jaroj. La sciigon pri ĝi li

ricevis de la dana reĝo Sven Estrids-son (1047—1076).

En sia historio episkopo Adam ankaŭ rakontas ke ĉiu 9-an jaron mezvintre estas granda idolana oferado en Upsala, Svedio (Midvinterblot) kiam la "sviones" oferas bestojn kaj homojn por kompatemigi la diojn. Li skribas ke "kristano rakontis al mi, ke li kun abomono vidis pendantajn 72 oferitajn korpojn de bestoj kaj homoj, en la oferparko".

La identigo de la diversaj lokoj en la rakontoj estas malfacile farebla pro manko de precizeco. Oni serĉis Vinlandon diversloke de la estuaro de St Lawrence-rivero ĝis Boston-regiono. Oni supozis ke Vinland estas Nova Scotia kaj la regiono ĉirkaŭ St Thomas. Ĝenerale oni celis al la orienta bordo de Labrador kaj ankaŭ New Foundland.

Apoge de la trovo ĉe Lake Nipigon 1931, la sciencisto Curran lanĉis novan teorion. Li opiniis ke la groenlandanoj velis norde de Labrador, tra Hudson Strait al la granda maro Hudson Bay, kies suda mallarĝiganta parto estas James Bay. Halluland do estas la roka orienta bordo. Markland la arbara bordo de James Bay, kaj do Vinland komenciĝas je Moose Factory, kio bone adaptiĝas al la priskriboj. Ĝia somera temperaturo nur per ĉirkaŭ 2°C malaltas de tiu de Toronto, kaj tie oni povas kulturi

giron kaj radik-legomojn. La elfluejo de Moose-rivero estas la plej konvena loko en James Bay, ĉar ĝi havas mildan klimaton kaj fekundan mulĉon kaj bonajn fiŝ-akvojn. Ĝi povas esti Straŭmsfjord, kie oni du fojojn travintris. Laŭ la rakontoj oni daŭrigis la veturon suden al loko, kiun ili nomis Hop. Supoze ili daŭrigis supren laŭ Moose-rivero. Sed la rakonto ankaŭ diras ke la ekspedicio partigis. Eblas ke kelkaj velis supren laŭ Albany-rivero al ĝiaj fontlagoj. Eblas ke kelkaj atingis ĝis Lake Superior kaj de tie al Lake Nipigon. La ekspedicio de Thorfinn ja restis tri jarojn en Vinland. Konante la vagemecon de la skandinavoj, ne estas kredinde ke ili longe restis en la sama loko, sed ke ili ofte estis vagantaj. De Moose Factory ĝis Lake Nipigon rektavoje nur estas 570 km. La regiono havas disbranĉitan riversistemon, kio faciligas la vagadon. La

centro de Vinland, kie ili trovis arĝojn kaj nekulturitan giron do troviĝus norde de Lake Superior. Tio bone adaptiĝas al la priskribo.

## LONDON-MÄRKET

finns nu att köpa. Använd brevmärket för världskongressen i London 1971. Gör en värdefull reklam. Sätt det på all post.

1 karta — kr. 1: 25

3 kartor — kr. 2: 75


Insätt likviden på postgirokonto 14 74 29-5 (Sv. Esperanto-Förbundet, specialkonto, Malmö).



# NIKOLAE IORGA — MEMORA MEDITADO

La 27 novembro 1940, Nikolae IORGA estis forŝirita el sia vilao, el Sinaia, pere de bando de krimuloj, kaj stumpita ĉe vojrande en la vilaĝo Strejnic, proksime al Ploesti.

La granda kaj mondfama scienculo rumana — "doctor honoris causa" de la Universitato de Uppsala — estis forŝirita de sia skribotablo, el plena kaj fruktodona laborado kreanta. Li klopodis tiam finfari la unuan volumon el larĝa laboraĵo sinteza, havanta la titolon Historiologio, en kiun li intencis investi sian tutan eksperimenton impresan de esploristo kompetenta, talenta artisto de la vorto kaj scienculo unika, kiel atestas tion la Antaŭparolo kaj tekstoj aperintaj postmorte (Materioj por homara historiologio. Eldonejo de la Rumana Akademio, 1968). Tiu kiu ĝis sia 69-a vivjaro publikigis 1250 da libroj kaj pli ol 25.000 artikolojn, klopodis kronumi sian verkaron kaj vivon per magistra apoteozo de la homaro, kiel produktanto de havaĵoj materiaj kaj spiritaĵoj laŭlonge de sia turmentita ekzistado sur la tuta planedo. En tiu ĉi nobla okupigo per kiu lia humanismo devis trovi la plej altan esprimon, la vereco estis la plej superega celo, kion li mem rekonas en la Antaŭparolo: "Mi volis, miaflanke, ke mi posedu pli da talento 'poeta', por esti pli proksime al la vereco." La brikoj amasigitaj por la granda konstruaĵo estas impresaj.



## NIKOLAE IORGA:

### OLDA ABIO

*Oni elbakis oldan abion  
Kiu donis tro da ombro;  
Kaj tiam el la malhela arbaro  
Aŭdiĝis pagana voĉo:*

*— Ho, vi, kiuj vivas en suna varmo,  
Vi mortigis nian praavon,  
Ke ĝi ne plu domaĝu vian vivsencon,  
Kial vi estas tiom paganaj?!*

*Dum ĝiaj multnombraj vivjaroj  
Daŭre de ĉagrenaj horoj,  
Sub ĝia ribela branĉaro  
Multaj trovis ŝirman rifuĝejon...*

*La oldulo kiu staris rekte surpinte  
Estis dumvoja gvidanto,  
Kaj dum krude amara tempo  
Ĝi ege spitis uraganojn.*

*Dumvive ĝi estis utila,  
Kaj nun, forpasinte,  
Kion alian ĝi povus alporti  
Ol ankoraŭ unu ĉerkon...?!*

(El la rumana lingvo trad.

Eugenia Morariu)

La famo pri la tragedia forpaso de Nikolae Iorga trovis tutmondan eĥon. La flagoj de 47 universitatoj estis funebre pendigitaj duonmaste por honori la memoron de la rumana grandulo.

La granda arthistoriisto franca, Henri Focillon, en decembro 1940, en sia parolado ĉe la radiostacio New York, diris interalie: "Ni, kiuj konis lin, ni kiuj amis lin, havis la privilegion vidi lin propraokule en sia radianta pleno, lin, kiu estis unu el tiuj legendaj personecoj, kiu enradikiĝis en la teron de unu lando kaj en la historion de la homara inteligenteco. Li aldonis al la konigo de dia instinkto tiun flamon poetan, kiu restas la distingo de l'genio. Neniu rebrilis pli forte kaj pli noble la vivon. De la alteco de siaj 70 jaroj, li estris la junularon, kvazaŭ montpinto lumradiata, dum la malsupraj regionoj estis kovrataj de ombro."

Kompilita de Eugenia Morariu

Bibliografio: "Nikolae Iorga kontraŭ la hitlerismo" de Titu Georgescu, Eld. Sciencia, Bukureŝto — 1966 "Tribuna", Cluj, Nr. 49 (723) 3 decembro 1970, artikolo verkita de Ion Lungu.

## NOVA KONKURSO DE LA POLA RADIO

10-tagan restadon en Pollando promesas la Pola Radio al la gajnonto de la plej nova konkurso. Temas pri respondo al tri demandoj. Findato la 28-an de februaro. Informoj ĉe Pola Radio, P.O. Box 46, Esperantofako Varsovio 1, Pollando.

En la svedlingvaj programoj de la Pola Radio oni sendas, eksperimente, esperanto anguletojn (trifoje ĉiun mardon). La sveda redakcio (sama adreso) deziras aŭdi la opiniojn de la aŭskultantoj pri tiu arango.



## ESPERANTO EN RUMANIO

En Bukureŝta Politekniko komenciĝis en oktobro j. k. nedevigaj E-kursoj kun 230 gestudentoj. Preskaŭ samtempe estis malfermitaj E-kursoj en la Konstrua Instituto kun 80 gekursanoj.

## HELSINGÖR 1971

### 40-jara feria kursarango

La internaciaj feriaj Esp-kursoj de Helsingör okazos 25/7—1/8 en La Internacia Altlernejo (tute moderna). Venu al Danlando por ĝui belan ferio-semajnon en vere Esperanta rondo kaj por ĉeesti nian 40-jaran jubileon. Prospekto senpage havebla ĉe

L. FRIIS

Ingemannsvej 9

DK-8230 Åbyhøj, Danlando

NB. Aŭtunaj feriaj Esp-kursoj okazos en la alterlernejo JUNAJ HEJMOJ ĉe Århus, Danlando, 17—23.10 1971. Programo baldaŭ havebla ĉe L. Friis.

Aperis la dua numero de la **Bulteno de INTER** — Societo por la Internacia Lingvo Esperanto en Radio. Eldonas la inciantintoj Iva kaj Lennart Aberg, Box 55028, 400 53 Göteborg. Krom informoj pri la agado tiu numero enhavas ankaŭ interesan artikolon pri "Kiel disvastiĝas la radioondoj" kaj "Kion mi povas aŭskulti per mia ricevilo?"



**Letero**, la ligilo de la esperantistoj en Göteborg, redaktata kaj eldonata de Oskar Svantesson, atingis sian 300-an numeron. Letero funkcias kiel rapida informilo por la esperantomovado en tiu tuta regiono kiun oni — el geografia vidpunkto ne tute ĝuste — nomas "okcidenta Svedlando". Ni gratulas kaj esperas pri ankoraŭ 300 numeroj!



# LONDON-KONGRESSEN

Inom kort kommer Dua Bulteno till alla anmälda med anmodan att beställa logi, utfärder etc. under själva kongressveckan. Som vanligt utsänder då SEF till alla som anmält sig genom SEF ett meddelande med upplysningar ang. inbetalning. Avvakta alltså detta meddelande. Alla som anmäler sig till den skandinaviska gruppresan skall ej beställa logi (det gör reseledaren) men väl utfärder under kongressen.

Genom en försening hos kongressbestyrelsen i London kunde kongresskortet utsändas först helt nyligen. Vi hoppas att alla anmälda nu har fått sina kort.

SEF

## 40-JARA JUBILEO EN LIDKÖPING

La plej malnova el la ekzistantaj esperantokluboj en Skaraborg, tiu de Lidköping, iĝis 40-jara pasintan jaron. La datrevenon oni festis per tutdistrikta renkontigo en restoracio Näcken la 20-an de novembro. Partoprenis preskaŭ 60 personoj.

Redaktoro Tiberio Morariu parolis pri "Oraj trezoroj gotaj — Komuna heredaĵo sved—rumana" en kunligo kun la ĵus okazinta ekspozicio en Stokholmo kaj Gotenburgo. Li ankaŭ prezentis bildojn el la hodiaŭa Rumanio Sune Ahlm aperis kiel preskaŭ profesie lerta sorĉisto, kaj juna triopo el la esperantoklubo de Skövde zorgis pri la muziko.

La najbaraj kluboj transdonis florbukedojn kaj la klubo de Falköping transdonis belan etan artaĵon "La rajdisto de Alleberg". La du lokaj gazetoj tre favore pritraktis la eventon. Iliajn reprezentantoj partoprenis dum la tuta vespero.

AB

36-jara laboristo deziras lerni svedan lingvon pere de korespondado. Lingvoj: germane, angle, svede, ruse kaj iomete hispane. Kontakton prefere kun geknaboj 30—40 jaragaj.

Helmut Senger, Fahnstr. 29, 7533 Welzow, DDR (Germana Demokratia Respubliko).

## Letervespero

16-an de marto 1971. Por 40 gelnantoj.

Esperantogrupo Rostock, Deutscher Kulturbund, 25 Rostock 1, Hermannstrasse 19 (DDR).

## PÅ TAL OM UEA...

Ni har väl sett i Revuo Esperanto förslaget "100 × 100", som går ut på att minst 100 personer skall under tre år utöver den ordinarie avgiften till UEA betala 100 gulden årligen. UEA är just nu i stort behov av snar ekonomisk hjälp icke minst på grund av prisförhöjningar i Holland. Just Sverige borde kunna ge ett effektivt och kraftigt bidrag.

SEF

## SINJORINO JULIA ISBRUCKER



Nia internacia movado profunde funebrias pro grava perdo. La 14.1.1971 mortis en Hago, en la aĝo de 83 jaroj, honora membro de UEA, vidvino de ing. J. R. Isbrucker (iama prezidanto de la Esp. Akademio), bopatrino de la franca komitatano de UEA s-ro Jean Guillaume. J. I. estis Esp-istino de 1909. En 1928 ŝi organizis la Int. Interreligian Konferencon en Hago kaj en 1930 ŝi fondis, kune kun Andreo Cseh la Internacian Cseh-Instituton de Esperanto, kiu dum jardekoj prizorgis organizadon de Esp.kursoj kaj instruistaj seminarioj en 5 kontinentoj. Ŝi estis la prezidantino de Universala Ligo kun sidejo en Hago (Riouwstraat 172). U. L. fondigis la 14.4.1942 kaj la oficiala lingvo de la Ligo estas Esperanto. Ĝi ne nur celas propagandi la ideon de Mondfederacio kun Mondregistro, sed ankaŭ eduki la popolojn al mondcivitaneco.

J. I. estis noble elstara figuro de la pacifista movado tutvive laboranta por interkompreno. Kuntradukinto de la romano Akbar de Van Limburg Brouwer kaj soltradukinto de La alia pasinteco de Rico Buthuis.

Ni sendas niajn sincerajn kondolencojn al ŝiaj parencoj el Svedujo, kies ĉefurbon, Stokholmon, ŝi ripete vizitis dum diversaj int. konferencoj, samkiel la Esp. edukejan fokuson de nia norda lando en ĝia suda nesto Frostavallen.

Io Iu

Konstrui per

# YTONG®

estas konstrui

ekonomie

brulsekure

## YTONGBOLAGEN

Hällabrottet





31 juli—7 augusti 1971  
LONDON, ENGLAND

blir platsen för Esperantovärldskongressen 1971. Givetvis skall Ni vara med. Anmäl Eder därför **redan nu till kongressen**. Svensk förmedlare (Peranto) av kongressanmälningar är som vanligt endast Svenska Esperanto-Förbundet.

Anmälningssblanketter erhålles efter rekvisition hos s-ino Ester Andrén, Ryttnästareg. 12, 217 52 Malmö (tel. 040/652 09).

Anmälan. Anmälningssblanketter och sedermera även beställningar av logi och utfärder skall insändas till samma adress, s-ino Andrén, Malmö, och icke till Holland eller England.

Likvid. Avgifterna insättes på postgirokonton 14 74 29-5, Svenska Esperanto-Förbundet, specialkonto, Malmö.

### KONGRESSAVGIFTER

(Obs! Svenska kronor)

	Till 31/3 1971	Till 20/6 1971
1. Kongresano, ne membro individua de UEA	136:—	148:—
2. Kongresano, individua (rekta) membro de UEA kun Jarlibro (MJ)	114:—	127:—
3. Kongresano, individua (rekta) membro de UEA kun Jarlibro kaj revuo "Esperanto" (MA)	93:—	105:—
4. Edz(in)o de Kongresano en kategorio 1	95:—	104:—
5. Edz(in)o de Kongresano en kategorio 2 aŭ 3	80:—	89:—
6. Junul(in)o ĝis inkl. 20-jara	41:—	45:—
7. Universitata student(in)o ĝis inkl. 30-jara	69:—	75:—
8. Blindul(in)o	55:—	60:—

Var vänlig skriv namn etc. tydligt på anmälningssblanketten men ej några avgifter (det gör SEF). Meddela i stället allting tydligt på postgirotalongen.

Rabatt får som synes direkta medlemmar i UEA. Det lönar sig alltså att bli direkt medlem. Ni vinner många fördelar. Gör allvar av att anmäla Er som direkt medlem av UEA.

Gåvor: Som vanligt mottager SEF och vidarebefordrar gåvor till Litteraturfonden (tävlingspremier), Blindfonden (de blindas kongress), Adopta Kaso (för dem som ej kan betala från eget land), och Adoptaj Gepatroj (helst min. sv. kr. 45:— för barnkongressen — eller det belopp, som Ni kan skänka). Givares namn publiceras. Det är ovanligt få svenskar som observerat dessa fonder.

SEF

# La Espero

Svenska Esperanto-Tidningen

Organ för Svenska Esperanto-Förbundet

Ansvarig utgivare: W. Wahlund.

Adreso: Krokvägen 85, 122 32 Enskede.

Ĉefredaktoro: Ake Blomberg, Lottkällsgatan 2, 531 00 Lidköping. Tel. 0510/235 26 (laborejo 0510/221 30).

Literatura redaktoro: Tiberio Morariu, Götaforsvägen 1,

124 30 Bandhagen. Tel. 08/86 50 65.

Teknika redaktoro: Sune W. Ahlm, Sandbergs väg 14, 460 60 Vargön. Tel. 0521/214 81.

Ĉiujn manuskriptojn al la ĉefredaktoro.

Prezo de jarabono: 15 sv. kr. (postĉeka konto 20 12).

Prezo de anoncoj: 1/1 paĝo 180:—, 1/2 = 90:—,

1/3 = 60:—, 1/6 = 30:—, 1/12 = 15:—.

Milimetra prezo 40 öre.

Korespondanconco: 25-vorta = 4:—, 50-vorta = 8:—.

## SVENSKA ESPERANTO-FÖRBUNDET

SVEDA ESPERANTO - FEDERACIO

Adreso: Jungfrugatan 30, 3 tr.  
114 44 Stockholm



Girkonto: 20 12

Telefona: 08/62 58 76

Dejortempo: Merkrede 18—20a horo

Kotizoj por Rektaj membroj: 15 kr., junuloj 7 kr.  
familia membro sen gazeto 5 kr.

### ESTRARO

Prezidanto: Jan Ströenne, Amiralsgatan 36, 211 55 Malmö.  
Tel. 040/12 92 11.

Vicprezidanto: Ragnar Hjorth, Kronobergsgatan 25, 4 tr 8. g.,  
112 33 Stockholm. Tel. 08/52 76 67.

Sekretario: Sven Alexandersson, Krokvägen 85,  
122 32 Enskede. Tel. 08/49 80 24.

Vicsekretarioj: Bertil Akerberg, Lillsvängen 39,  
126 57 Hägersten. Tel. 08/46 29 95.

Artur Malmkvist, Asögatan 182, 116 32 Stockholm.  
Tel. 08/41 78 74.

Franko Luin, Mygdalsvägen 123, 135 00 Tyresö.  
Tel. 08/712 82 91.

Kasistino: Maria Wästfelt, Cedergrensvägen 27,  
126 36 Hägersten. Tel. 08/45 02 41.

### FÖRLAGSFÖRENINGEN ESPERANTO

ELDONA SOCIETO ESPERANTO

Adreso: Esperantoförlaget, Fack, 200 42, Malmö 7  
Ejo: Möllevångsgatan 20 B

★

Dejortempo 1 sept.—15 majo:  
merkrede 10.00—11.00      ĵaŭde 17.00—18.00

Skribaj mendoj ekspedataj dum la tuta jaro.

Tel. 040 / 12 20 29. Postgiro 578.

★

Administranto: Anna-Greta Ströenne

Prezidanto: Sven Sjöblom, tel. hejma: 040/11 25 78



# ANMÄLAN

Medföljer som tidningsbilaga

till Svenska Esperanto-Förbundets 65:e årskongress  
i Stockholm, 29—31 maj 1971

1 Namn .....

Adress .....

2 Namn .....

Adress .....

3 Namn .....

Adress .....

## Följande beställs

Deltagarkort SEJU-medlem ..... 10:— ..... pers.

Deltagarkort ..... 25:— ..... pers.

## Logi

Dubbelrum 2 nätter ..... 86:— ..... pers.

1 natt, ..... maj 43:— ..... pers.

Enkelrum 2 nätter ..... 102:— ..... pers.

1 natt, ..... maj 51:— ..... pers.

Ungd.-logi 2 nätter (SEJU-medl.) 20:— ..... pers.

1 natt, ..... maj 10:— ..... pers.

Frukost 2 morgnar ..... 14:— ..... pers.

1 morgon, ..... maj ..... 7:— ..... pers.

Supé pingstaffon, inkl. buss ..... 40:— ..... pers.

D:o, vegetarisk mat ..... 40:— ..... pers.

Bussutflykt annandagen, inkl. kaffe .. 15:— ..... pers.

## Övrigt

Kuponger för rabatt på järnväg inom Sverige utsänds av LJK samtidigt med deltagarkort.

Extrabeställningar betalas direkt till hotellet (Malmen).

Samtidigt med anmälan insänder jag kr. ....  
till postgiro 50 74 61-2, Kommittén för esperantokongressen  
i Stockholm.

Datum .....

Underskrift .....

Anmälan sänds till Esperantokongressen 1971, Gerdman,  
Sibyllegatan 83, 114 43 Stockholm.  
Telefonkontakt: Gun Gerdman, 08 / 60 49 72.

**Sista anmälningsdag: 30 april 1971.**

Samman-  
räkning

LJK ant.

Anmälan .....

Avgift .....

Pers. ....

Deltk. ....

Notering .....